Post la fermo de la kongreso okazis pluaj ekskursoj. Unue al la mezepoka burgo *Haut-Koenigsbourg*, kiu troviĝas ĉirkaŭ tridek kilometrojn norde de *Colmar*. Impona konstruaĵo kun multaj ĉambroj impresis nin. Vilaĝo *Ribeauvillé* estas konata pro vinkultivado. En *Hunawihhr* troviĝas ankaŭ parko de la cikonioj kaj lutroj. Tie estas prizorgataj diversaj bestoj. Ni observis plurajn cikoniidojn dum la manĝado. Kelkaj estis freŝe naskiĝintaj (du-tagaj) kaj aliaj kelkmonataj. Ili havis nekredblan apetiton. Dum la prezentado de lutroj ni spektis trejnatajn kormoranojn, pingvenojn kaj aliajn bestojn. Ĝi estis tre interesa spektaklo aliamaniere prezentita ol oni kutimas vidi en amuzparkoj. Tre pitoreska estas la urbeto *Eguisheim*, kiu famas pro tiea protektantino de Alzaco, *Sankta Odile* kaj pro la naskiĝo de la papo Leo la IX-a (1002-1054). Vera vivanta vilaĝo, al kiu estis translokitaj aŭtentikaj trabfakaj domoj estas la Ekomuzeo de *Ungersheim*. Amaso da cikonioj instaligis en tiu loko. La kongreso estis riĉenhava kaj bonetosa. Koran dankon al la organizantoj! La belega urbo *Colmar* ravis ĉiujn.



COLMAR 2017



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

Nova ekspozicio en Svitavy

Liba Gabalda

La 9-an kaj la 10-an de junio 2017 en la Esperanto-muzeo de la bela ĉeĥa urbo *Svitavy* estis inaŭgurita tutjara ekspozicio "La homo kontraŭ Babelo". Ĝi estas instalita omaĝe al la 100-jara jubileo de la forpaso de la iniciantinto de Esperanto la Majstro L.L. Zamenhof. Sur diversaj paneloj kaj en multaj vitrinoj vizitantoj povas vidi interesajn esperantaĵojn; ne nur librojn, gazetojn, korespondaĵojn, memoraĵojn, sed ankaŭ utilajn informojn pri Esperanto, pri ĝia gramatiko kaj funkciado kaj aliajn variajn materialojn rilatantaj al ĝi.

Vendrede posttagmeze la programo estis prezentita por la publiko ĉeĥlingve. La sama programo ripetigis sabate en Esperanto. Je la 10-a horo bonvenigis la ĉeestantojn la prezidantino de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio Libuše Hýblová. Kun Petr Chrdle ili menciis ĉiujn gratulmesaĝojn kaj kelkaj el ili estis legitaj. Bondeziris la prezidanto de UEA Mark Fettes kaj la eksprezidantoj Renato Corsetti kaj Probal Daşgupta, de la Interkultura Centro Herzberg Zsófia Kóródy. Gratulis ankaŭ aliaj Esperanto-organizoj. Poste la eksterlandaj gastoj prezentis siajn salutojn. La plej fora venis el Japanio.

Ege interesan kaj ampleksan ekspozicion prezentis kaj inaŭguris Pavla Dvořáková. Jana Křížková montris genealogian arbon de la familio Zamenhof. Pri la "Lastaj tagoj de L. Zamenhof" parolis Miroslav Malovec. La novan retejon zamenhof.info prezentis juna staĝanto ĉe E@I el Gruzio Laŝa Ĉaĥunaŝvili. Pri diĝita havaĵo rilate al L.L. Zamenhof kaj la aktivecoj de la Esperanto-muzeo en Vieno parolis ĝia estro Bernhard Tuidler. Estis deklamitaj kelkaj poemoj. Pavla pretigis specialan ne tre facilan kvizon rilatan al Esperanto. Por faciligi la solvon oni povis serĉi la ĝustajn respondojn sur la ekspoziciitaj paneloj. Post la solena malfermo ni estis invititaj al tostado kun abunda bufedo pretigita de lokaj klubanoj.

La posttagmeza programo komenciĝis per prezento de mallonga filmo pri Pardubice, la urbo kie estis eldonita la unua lernolibro en Ĉeĥio. Petr Chrdle prelegis pri František Vladimír Lorenc (konata sub la nomo Francisko Valdomiro Lorenz), kiu eldonis en la jaro 1890 la unuan lernolibron por ĉeĥoj. Poste li elmigris kaj vivis en Brazilo. Ni multon eksciis pri tiu forgesita ĉeĥa genio kaj poligloto, kiu scipovis kaj parolis pli ol cent lingvoj. Martin Stuppniĝ el Aŭstrio kaj Margit Turková solene baptis biografian libron pri Lorenc de Vlastimil Novobilský.

Post la paŭzo ni spektis belajn bildojn pri Nepalo kaj rakontado de Ján Vajs el Slovakio pri la 12-a Internacia Himalaja Renkontiĝo, kiun li partoprenis ĉi-jare komence de marto kun grupo de kvin samlandanoj. Mi rememoris nian restadon en tiu ekzotika lando antaŭ du jaroj.

Vendrede vespere ni spektis kulturen programon en la bela salono *Ottendorfer* pretigitan de la loka grupo en la kadro de la Muzea nokto. Krom aliaj prezentadoj ni ĝuis viziton de Ludoviko Zamenhof (Jan Řepa) kun sia edzino Klara (Dagmar Martinková). Sabate vespere koncertis la muzikgrupo NOPROBLEM. Ĉe la fino estis baptita ilia nova KD fare de la direktorino de la urba muzeo Blanka Čuhelová kaj de Martin Stuppniĝ la honora membro de IFEF.

La vespero finiĝis en muzeo en agrabla kaj bonhumura etoso kantante ĉeĥe, pole kaj esperante en akompano de gitaro preskaŭ ĝis noktomezo. Ĉiuj ĝuis agrablajn du tagojn en *Svitavy*. Se vi iam vojaĝos tra tiu bela regiono, ne preterpasu la okazon viziti la Esperanto-muzeon!

Liba Gabalda





Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

La galego

Ricardo Coutinho

Alvenis al la urbo Valencio de la provinco de Karakaso, galego kiu nomiĝas Manuel, kiel multaj inmigrintoj fuĝis de la mizero kaj malsato en sia lando kaj kun la espero atingi sufiĉe bonan vivstaton. Lasis en Galegujo belan edzinon kaj du gefilojn, li ne riskis sian familion vivi la grandan vojaĝosuferon, memoru ke la ŝipoj daŭras almenaŭ ses monatoj tra la atlantiko kaj la danĝeroj de tempestoj kaj fantaziaj monstroj de la oceano.

Valencio estas proksima al la porto Kabejo kaj per ĝi eniris al la provinco de Karakaso. Kun granda peno kaj mono portita de Galegujo li kreis malgrandan bazon, dungis liberigitan negrulinon kiu nomiĝas Marta. Post longa interrilato, aperis ridoj, post karesoj kaj amoro, Marta fariĝis amantino de Manuelo, kaj eĉ de tiu amorrilato naskis du filojn.

La vivo de la galego estis tre gaja sed sufiĉe bona por forgesi siajn devojn en lia malproksima patrujo. Liaj ĉefaj klientoj estas la riĉaj kaj mezriĉaj familioj de la provinco, speciale de la urbo mem, homoj kiuj havas grandajn bienojn de semado kaj produktado de kakao (ĉokoladosemo). Tiam la ĉokolado estas varo preskaŭ eksklusiva por la riĉuloj de Eŭropo, la aristokrato kaj la plej riĉaj komercantoj de tiu kontinento. Post longa recesio en Eŭropo, la prezo de ĉokolado falis, la aĉetokapablo ankaŭ falis, tiuj valenciaj bienistoj lasis al la galego Manuel grandan ŝuldon en lia bazaro, ĉar ili nur pagas kiam ili vendas siajn ĉokoladosemojn. Pro granda timo pro bankroto li decedis peti la ŝuldopagon kontraŭ novajn petojn.

Tio generis malkontenton en la riĉaj familioj kaj lia amorrilato kun la liberigita negrulino Marta esti temo ofta en la riĉaj familiaj rondojn. La sinjoro Fernando sugestis al sia edzino sugesti tiun moralan temon al la ĉefa pastro de la preĝejo de Valencio, ŝi, Veronika, pia katolikistino akceptis tiun sugestion kiel devo kristana, kaj kun aliaj sampiulinoj iris ĉe la pastrejo kaj postulis al la pastro fari plendojn antaŭ la ĝenerala Kapitano Jozefo Manuel Torres. Dum la unuaj renkontiĝoj kun la ĝenerala Kapitano tiu afero estis traktita kiel nur postulo de "fanatikaj" piulinoj de Valencio, sed iom post iom la kritiko al la bazaristo Manuel estis pli fortaj kaj al tio unuiĝis la edzoj de tiuj piam virinoj, ili postulis ke la galego translokiĝu al Galegujo kun lia edzino kaj familio, kiu estis benata por Dio kaj lasu tiun negrulinon, kiu estas vera ŝancoserĉistino kaj pekino.

Post longa plendado, la kapitano sendis leteron al la edzino de la bazaristo Manuel en Galegujo. La edzino de la galego konsentis ke ŝia edzino revenu al sia hejmo en ilia patrujo. Do, la ŝanco por la bienistoj malaperi la bazariston kaj la ŝuldon jam estis evidenta. La ĝenerala Kapitano prenis kontraŭvole la galegon kaj enŝipigis lin por iri rekten al Galegujo. Marta kaj siaj filoj estis forpelitaj de la bazaro, la bazaro estis fermita, la bienistoj forgesis rapide la ŝuldon kaj la galegon, la valenciaj galegidoj suferis la mizerojn oftajn de la malriĉuloj kaj de tiuj kiuj ne havis la ŝancon de la pia moralo de la riĉeco.

Ricardo Coutinho



Nereala Fantazio


Samuel Rondón

Prenu vi mian manon
vi iros flugi kun mi
sur bela amela nub',
super la maro, sub la sun'

Mi montros al vi la mondon
kaj tutajn ĝiajn lokojn,
Ni rigardos belajn pejzaĝojn
Ni daŭrigos nian vojaĝon

Vi estos emociota
pro vidi tiel la mondon
Vi sentos en via vizaĝo
la venton kaj la varmon

Ni estos tre feliĉaj
Dum traveturas ni la mondon,
Por ke vi estu feliĉa:



Samuel Rondón, venezuela esperantista poeto, aĝo: 17



La kongreso estas urbo de gastoj

Mark Fettes

Mark Fettes, prezidanto de UEA, Malfermo de la 102^a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, 2017

Estimataj honoraj gastoj, karaj kongresanoj,

En ĉi tiu horo kaj loko ni spertas denove tiun miraklon, kiu nomiĝas Universala Kongreso de Esperanto. Kiel fenikso renaskiĝante el cindroj, ĉiujare dum unu semajno reaperas, ie en la mondo, la kultura ĉefurbo de la esperantistoj. Kial nomi ĝin miraklo? Pro tio ke ĝi estas ĉiam rekoneble la sama urbo, sendepende de tio, ĉu ĝi troviĝas en Havano aŭ Helsinko, en Vieno aŭ Vankuvero, en Tokio aŭ Telavivo. Alvenas la unuaj dekoj da homoj, tiam la unuaj centoj, kaj kun ili ekŝvelas la granda ondo de renkontiĝoj kaj babiladoj, de kunmanĝado kaj kunkantado, de prelegoj kaj kunsidoj kaj konversaciaj rondoj, de teatraĵoj kaj koncertoj kaj konkursoj, de ĉiuj manieroj uzi lingvon por kunligi homojn. Tia estas nia urbo. Bonvenon en ĝin!

Mi konfesu tuj, ke ni ne havas ĉiujn zorgojn, kiujn havas ordinara urbo. Se temas pri loĝejoj kaj transportiloj kaj akvo kaj elektro, se temas pri vendejoj kaj polico kaj hospitaloj, ni povas feliĉe lasi tiujn servojn en la manoj de niaj gastigantoj — ĉi tie la koreoj, kiuj pravas sin je ĉiu paŝo ege bonaj gastejestroj. Ni estas aparte feliĉaj, ke ĉi-foje honoris nin per sia ĉeesto niaj efektivaj gastejestroj: unuavice la urbesto de Seulo mem, kaj duavice la prezidanto de Hankuk Universitato de Fremdlingvaj Studoj, nia kongresejo. Ni kore dankas ilin ambaŭ kaj ĉiujn iliajn kolegojn en la urbaj kaj universitataj servoj, kiuj zorgas pri ni dum ĉi tiu semajno!

Ni estas, do, iusence urbo de gastoj. Ni pensu pri tio dum momento. Ja ekzistas diversaj specoj de gastoj — eĉ de esperantistaj gastoj! Estas gastoj kiuj malplenigas la fridujon kaj la vinŝrankon, tretas koton tra la domo, piedbatas la hundon kaj insultas la najbarojn. Aliflanke, estas gastoj kiuj kunportas donacojn, komplimentas pro la manĝoj, helpas pri la purigado, kaj ludas kun la infanoj. Fari tion kapable kaj bele ne estas tiel simpla afero.

Oni devas lerni esti tia gasto, kaj kredeble re- kaj relernadi, ĉar en ĉiu vojaĝo oni renkontas novajn homojn, novajn kulturojn, novajn situaciojn. Lerni bone gastigi similas al la lernado de lingvoj; ĉiam restas pli por malkovri.

Mi pensas ke Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, estis ankaŭ nia unua granda teoriisto pri gastado. Jam en la Unua Libro li skribis pri sia vizio pri lingvo, kiu “ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa.” Per tia priskribo ni povas bildigi al ni Esperanton ĝuste kiel bonan gaston, kiu apenaŭ ĝenas “la doman vivon” de siaj gastigantoj, dum ĝi alportas valorajn donacojn, interalie pli vastan komunikadon kaj pli profundan egalecon. Kaj dudek kvin jarojn poste, kiam Zamenhof turnis sin ĉiam pli energie al la ideo de homaranismo, ni povas vidi en tio daŭrigon de lia insistado pri la gasta etiko. Ĉar la homaranismo esence konsistas el principoj por harmonia kunvivado kun aliaj homoj, kaj la Deklaracio pri Homaranismo estas kvazaŭ konsilaro pri bona gastado en mondo de granda diverseco lingva, kultura kaj religia.

Ĉi-jare ni solenas la centan datrevenon de la morto de Zamenhof. Tra la mondo okazas ceremonioj, simpozioj, konferencoj dediĉitaj al lia vivoverko. Sed mi volas pledi por ankoraŭ pli vasta kompreno de ĝia signifo, kiel elemento en la daŭranta homara strebo vivi harmonie sur nia malgranda kaj unika planedo. Ŝajnas klare al mi, ke se Zamenhof vivus hodiaŭ, li senrezerve aliĝus al tiuj, kiuj alvokas por pli ekologikonforma konduto de niaj nuntempaj socioj. Kiel ni ĉiuj povas atesti, nia industria civilizacio, inventaĵo de la lastaj jarcentoj, tendencas al troa, eĉ senbrida eksplutado de la naturo, kondukante ĝuste kiel la plej malbona gasto imagebla, kiu ne nur malpurigas la domon sed en la fino detruas ĝin. Tio estas precize la malo de la konduto, kiun rekomendus Zamenhof, ĉar se ni sekvas lian pensofluron, homarano ne povus esti alia ol bona samterano. Ambaŭkaze temas pri bona gastado,



kun identa etika sinteno: paŝi leĝere, ami la aliulon, celi al daŭripovaj rilatoj de reciprokeco. Se la aliulo povas esti ankaŭ besto, planto, rivero, dezerto, arbaro, aŭ kiu ajn alia parto de la naturo, tio ŝanĝas nenion esencan pri la dezirinda konduto.

Tiuj pensoj venis al mi kvazaŭ enkonduke al nia ĉi-jara kongresa temo: "Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo". Unuavide tiu temo ŝajnas malproksime de la pensaj kontribuoj de Zamenhof, ĉe kiu oni vane serĉus vortojn kiel "daŭripovo" kaj "ekologio", ĉar en lia epoko oni ankoraŭ ne elpensis ilin. Pli profunda rigardo tamen montras la grandan kongruon inter lia rezonado kaj tiuj nuntempaj konceptoj. Daŭripovo, ni povus diri, estas nia nuntempa maniero paroli pri ne-entrudiĝemo, tiu zamenhofa koncepto kiun ni retrovas jam en la Unua Libro. Daŭripova socia evoluo estas tia evoluo, kiu reduktas la trudiĝemon de la socio al la ekologiaj kaj kulturaj sistemoj kiuj vivtenas ĝin. Kaj daŭripova turismo estas tia turismo, kiu celas disvolviĝi konforme al la bezonoj kaj kapabloj de la gastiganta lando kaj popolo, kontribuante al ĝia ekonomia, ekologia kaj kultura bonfarto. Kiel bona gasto.

Bona gasto ankaŭ strebas lerni de siaj gastigantoj. Kaj do por kelkaj minutoj mi invitas vin akompani min tra la vivoverko de korea pensulo, homo kiu vivis pli ol mil jarojn antaŭ Zamenhof, sed kiu ŝajnas al mi lia spirita parenco. Lia nomo estis Choi Chi-won; poste en sia vivo li alprenis la kromnomon Go-un, "Soleca Nubo". Kiel Zamenhof, li naskiĝis en reĝlando ĉe la periferio de granda imperio, la ĉina Tang-dinastio. Zamenhof edukiĝis en la rusa, fine vojaĝante al Moskvo por siaj universitataj studoj; Choi edukiĝis en la ĉina, irante nur 11-jara al Xian por enskribiĝi en la klasika imperia studsistemo; li restis for el Koreio ĝis sia 27-a jaro. Kaj ambaŭ homoj revenis hejmen forte konvinkitaj pri la bezono de spirita-etika reorientiĝo en la socio ĉirkaŭ si, al kiu ili dediĉos la reston de sia vivo.

Kiel Zamenhof, Choi pensis tute neortodokse. Li malakceptis la tradiciajn dividojn inter popoloj, ŝtatoj kaj religioj, resumante sian sintenon per la vortoj:

La vero ne malproksimas de la homo,
Por homo ne ekzistas lando fremda.

Ĉerpante el profunda kono de la instruoj de Konfuceo, Laŭzio kaj Budho, li pledis por ilia kunigo en komuna harmonia tuto kiun li nomis pung-nyu, laŭvorte "vent-fluado", sed kiu esprimas specon de serena kaj malfermkora vivĝojo. Proksimeco al la naturo estas esenca dimensio de tiu spirita orientiĝo, kaj efektive Choi pasigis siajn lastajn jardekojn kiel soleca saĝulo ĉe la montoj, verkante multajn naturpoemojn kune kun traktaĵoj pri filozofio kaj historio.

Kaj tamen ni devas konfesi, ke ambaŭ homoj iusence malsukcesis, laŭ siaj propraj kriterioj. Zamenhof, kiel ni scias, mortis meze de la Unua Mondmilito, laca kaj malgaja pro tiu eksplodo de interpopola malamikeco, kontraŭ kiu li luktis la tutan vivon. Kaj Choi vivis sufiĉe longe por vidi la definitivan disfalon de ambaŭ dinastioj, la ĉina Tang kaj la korea Silla, kiujn li provis renovigi kaj redirekti per siaj instruoj.

Kion do ni povas lerni, rigardante kune al la hebrea-rusa pensulo kaj la korea-ĉina pensulo, disigitaj de vastaj spacoj de tero, tempo kaj tradicio? Unue, ke la strebo kompreni la mondon kiel homo, preter la limoj de sia propra edukado, estas strebo vere universala. Ĝi ankaŭ klare estas strebo malfacila, en kiu oni riskas, kiel diris Zamenhof, "la batojn de l' sorto, la mokojn de l' homoj." Eĉ Choi, kies verkaro dum longa tempo estis konsiderata esenca parto de la korea kultura heredaĵo, devis suferi en pli modernaj tempoj la kritikojn de la naciistoj, kiuj opiniis lian amon al la ĉina kulturo kvazaŭ perfido al la patrujo. La batalo kontraŭ ŝovinismo kaj fremdulmalamo estas batalo eterna, en kiu oni malverŝajne atingos definitivan venkon.

Due, ĉe ambaŭ pensuloj ni vidas ke amo al la homaro kunekzistas kun amo al la propra gento, la propra hejmlando, kaj aparte ĉe Choi, la propra tero. Oni ne lernas esti bona gasto nur per vojaĝado; oni devas ankaŭ lerni kaj praktiki tion hejme. Zamenhof kompreneble estis sindediĉa filo, frato, edzo kaj patro; li estis ankaŭ klera hebreo, "hebreo el la getto" kiel li mem deklaris sin, kaj lia vivoverko portas multajn spurojn de tiuj ligitecoj. Choi, reveninte al Koreio unuavice por prizorgi siajn gepatrojn, malkovris kaj esprimis en siaj postaj jaroj profundan spiritan rilaton kun la korea naturo.



Al mi tio ŝajnas grava kaj foje subtaksata aspekto de la esperantista tradicio — ke nia movado kultivas ne nur vojaĝemon kaj internacian amikecon, sed ankaŭ aprezon de la propraj radikoj, certe lingvaj, sed ankaŭ kulturaj kaj eĉ ekologiaj. Tio estas nepre parto de la vojoj al daŭripovo, pri kiu indas diskuti ĉi-kongrese.

Trie, tiu gasta etiko, kiun Choi kaj Zamenhof ambaŭ siamaniere primeditis kaj disvolvis, konsistas en sinteno kaj praktiko ne nur sciencaj sed ankaŭ artaj. Ne ŝajnas al mi hazarde, ke ambaŭ homoj estis ankaŭ poetoj, kies plej famaj ideoj ofte esprimiĝis verse kaj metafore. Por ni esperantistoj, la muroj de miljaroj, la monto granita, la stelo en nokta ĉielo, tiuj kaj multaj aliaj stilfiguroj de Zamenhof formas parton de nia memkompreno. Kaj Choi sukcesis kapti, per elegante simplaj naturbildoj, la animstaton de homo vojaĝanta inter hejmoj:

La ŝipo laŭ la plano venas ĉiun duan jaron;

Hontas sentaŭgulo hejmeniri purpurrobo.

Abrupta adiaŭo en Ŭuŝengo folifale;

Nun al Ŝilla alrigardi, kie fonas foraj floroj.

Iktero en la valo fluegemas longe, alte;

Porkoj de Ljaŭdongo senhonte spikumadas.

Volfirmo nepras nun, por poste ne bedaŭri.

Mi tostas sorĉan belon de ĉi natur' Gŭanglinga.

Se vi sentas iom da malgajo en tiuj linioj, vi certe pravas. Bona gasto, bona turisto, kunportas kun si hejmsopiron. Kaj mi celas ne nur sopiron al la fizika hejmo, sed al hejmeco, al sento de aparteno. Ĉar ĉu ne ĝuste tion ni ĉiuj serĉas, ni kongresanoj, kiuj vojaĝis centojn kaj milojn da kilometroj por esti kune ĉi tie, por dum unu semajno senti nin samurbanoj? Ni trovas, aŭ esperas trovi, senton de aparteno kiu estas alia ol tiu kiun ni sentas en niaj loĝlokoj, alternativan hejmecon kiu kompletigas kaj pliriĉigas niajn aliajn hejmecojn.

Jen do nia paradoksa konkludo. Daŭripova turisto — en la zamenhofa lingvaĵo, homarano — estas homo, kiu sentas sin ĉiam kaj ĉie samtempe hejme kaj gaste.

Ni paŝas zorge en la hejmoj de aliaj, ĉar ni komprenas, ke ili estas ankaŭ niaj hejmoj. Ni traktas delikate kaj ameme la propran hejmon, ĉar ni komprenas, ke ankaŭ tie ni finfine estas gastoj. Jes, ni ĉiuj estas gastoj sur ĉi tiu tero, kiun ni vizitas por tro mallonga tempo, apenaŭ sufiĉe por kompreni nin mem, por ne paroli pri la kompreno de niaj samteranoj. Tio estas nia sorto, kiel niaj grandaj antaŭuloj kiel Choi kaj Zamenhof klopodis klarigi al ni siamaniere, per siaj verkoj kaj siaj vivoj.

La kongresa semajno etendiĝas antaŭ ni. Mi esperas ke vi jam nun komencas senti vin hejme en nia urbo de gastoj. Mi esperas ke la multaj riĉaĵoj de la programo liveros abundajn okazojn por sperti apartenon, por kleriĝi pri nia kulturo, por disvolvi vian esperantistecon. Kaj mi esperas ke vi samtempe profitos la ŝancon ekkoni Koreion, se vi venis ĉi tien el alia lando, ekkoni ĝin kiel la hejmon de la koreoj sed ankaŭ de la korea naturo, sen kiu ĝi ne estus Koreio. La vojo al daŭripovo iras tra miloj kaj milionoj da tiaj spertoj, per kiuj ni lernas ami la diversecon de la mondo kaj labori por ĝia protektado kaj prizorgo. Kiel bonaj gastoj.

Mark Fettes



Directorio de Asociaciones en América

El Movimiento Esperantista (la *Movado*) es muy amplio y diverso. En todo el mundo hay una variedad de clubes, organizaciones, asociaciones, editoriales, institutos, etc, dedicados a la difusión y el uso del idioma internacional Esperanto. En este directorio te mostramos las páginas oficiales de las principales asociaciones de Esperanto en América. Presta especial atención a las páginas y recursos de asociaciones en países de habla hispana, puesto que podrás aprovechar tu lengua materna (el español), para aprender Esperanto o para participar en los eventos y encuentros en todo el continente.

CANADÁ

Esperanto en Canadá: <http://www.esperanto.ca/>
 Esperanto-Societo Kebekia: <http://www.esperanto.qc.ca/eo>
 Boletín La Riverego: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego>

ESTADOS UNIDOS DE NORTEAMÉRICA

Esperanto-USA: <http://www.esperanto-usa.org/>
 Usona Esperantisto, boletín de Esperanto-USA:
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>
 Sociedad Esperantista de Washington: <http://www.esperantodc.net/>
 Sociedad Esperantista de New York: <http://www.esperanto-nyc.org/>
 Esperantic Studies Foundation: <http://esperantic.org/en/>
 Editorial Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

CUBA

Asociación Cubana de Esperanto: <http://www.esperanto.cult.cu/>
 Radio Havano Kubo: <http://www.radiohc.cu/eo/>

MÉXICO

Federación Mexicana de Esperanto:
<http://esperanto-mexico.org/>
 Revista Ni ĉiuj:
<http://esperanto-mexico.org/es/nicxiuj>
 Asociación Mexicana de Esperanto:
http://meksikoesperanto.org/el_esperanto_en_mexico.htm

VENEZUELA

Asociación Venezolana de Esperanto:
<http://www.esperanto-venezuela.org>

BRASIL

Brazila Esperanto-Ligo: <http://esperanto.org.br/bel/>
 Brazila Esperantista Junulara Organizo: <http://bejo.esperanto.org.br/>
 Esperanto @ Brazilo (portugués): <http://esperanto.brazilo.org/wp2/>
 Esperanto Ilustrado (portugués) :
<http://www.esperantoilustrado.blogspot.com.br/>
 Esperanto Ilustrita (esperanto):
<http://www.esperantoilustrita.blogspot.com.br/>
 Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>
 Esperanto-Asocio de San-Paŭlo: <http://easp.org.br/portal/>

COLOMBIA

Liga Colombiana de Esperanto:
<http://www.oocities.org/kolombio/>
 Kolombia Esperanto-Ligo:
<http://esperantokalio.blogspot.com/>

URUGUAY

Urugvaja Esperanto-Societo: <http://www.esperanto.org.uy/>

CHILE

Asociación Chilena de Esperanto:
<http://esperanto.cl/>
 Juventud Esperantista Chilena:
<http://chejo.blogspot.com>

ARGENTINA

Liga Argentina de Esperanto: <http://www.esperanto.org.ar/>
 Blog de la Liga: <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/>
 Bonaera Esperanto-Asocio: <http://esperanto-bea.blogspot.com/>



Esperanto: Movimiento Internacional

El Movimiento Esperantista es un movimiento verdaderamente internacional, multicultural, que reúne en un solo esfuerzo muchas culturas, pueblos y naciones, sin discriminación de razas, idiomas, religiones o inclinaciones políticas. Esperanto significa idioma pero también significa cultura internacional, derechos humanos, democracia y justicia social. Todas las asociaciones y hablantes del idioma internacional tienen un centro común, la Asociación Universal de Esperanto, que organiza, entre otras cosas, los Congresos Universales de Esperanto que se llevan a cabo en una ciudad del mundo una vez cada año.

ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE ESPERANTO y otras organizaciones esperantistas

Asociación Universal de Esperanto (UEA):
<http://www.uea.org/info/hispana.htm>

UEA en Facebook:
<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Centro multilingüe sobre el Esperanto: <http://esperanto.net/>

Unión Europea de Esperanto: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Liga Internacional de Pedagogos Esperantistas:
<http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=6565769>

edukado.net: <http://edukado.net/>

Academia Internacional de las Ciencias San Marino:
<http://www.ais-sanmarino.org/index.htm>

Asociación Mundial Anacional: <http://www.satesperanto.org/>

Academia de Esperanto: <http://www.akademio-de-esperanto.org>

Periódicos y revistas en línea

Revista Kontakto (revista juvenil): <http://kontakto.tejo.org/>

Eŭropa Bulteno (Boletín de Eŭropa Esperanto-Unio):
<http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/>

La Ondo de Esperanto y editorial Sezonoj: <http://esperanto.org/Ondo/>

La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Le Monde diplomatique: <http://eo.mondediplo.com/>

La Esperanto-centro EVENTOJ: <http://www.eventoj.hu/>

La Esperanta Gazetejo: <http://www.gazetejo.org/gazetejo>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/>

El Popola Ĉinio (Desde la China del Pueblo):
<http://esperanto.china.org.cn/EL/EL/EIPopolaCxinio/>

Monato (actualidad, noticias y opinión): <http://monato.esperanto.be/>

Usona Esperantisto (Esperantista estadounidense):
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

En España

Federación Española de Esperanto:
<http://www.esperanto.es/hef/>

Hispana Esperantista Junulara Societo:
<http://www.esperanto.es/hef/index.php/hejs>

Asociación Catalana de Esperanto:
<http://www.esperanto.cat/web/?lang=ca>

Kataluna Esperanto-Junularo:
<http://esperanto.cat/kej/ca>

Kataluna Esperantisto (revista):
<http://www.esperanto.cat/web/KatalunaEsperantisto?lang=ca>

Arunda Esperanto-klubo:
<http://esperantoarunda.blogspot.com/p/eventos-eventoj.html>

Asociación Andaluza de Esperanto:
<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

Radios y podcasts

Radio Vatikana (Ciudad Vaticano):
<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>

Radio Havano Kubo (Cuba): <http://www.radiohc.cu/eo/>

Muzaiko (Internacional): <http://muzaiko.info/>

Pola retransmisión (Polonia): <http://pola-retransmisión.org/>

Kern.punkto (Alemania): <http://kern.punkto.info/>

Peranto (Alemania): <http://members.aon.at/aldone/retransmisión/>

3ZZZ Radio en Esperanto (Australia):
<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Varsovia Vento (Polonia): <http://www.podkasto.net/>

Editoriales

Eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com/>

Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

Flandra Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.be/fel/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Eldona Esperanto-Societo: <http://www.algonet.se/~eldona/>

KAVA-PECH: <http://www.kava-pech.cz/index-esperanto.html>

Libros de la serie Stafeto de Juan Régulo Pérez:
<http://www.esperanto.be/fel/but/stafeto.php>



Hazte miembro de nuestra asociación y ayúdanos a continuar nuestra labor...

Síguenos en nuestras redes sociales:

www.facebook.com/EsperantoVE

www.twitter.com/EsperantoVE


www.instagram.com/EsperantoVE

- Contribuyes en el fortalecimiento de la promoción y difusión del idioma en el país.
- Cursos y talleres gratuitos.
- Préstamo circulante de libros.
- Descuentos en libros, encuentros, talleres, materiales y más.

También puedes ayudarnos con una donación a nombre de:

**Asociación Venezolana de Esperanto (RIF: J-00187027-0)
Banco Banesco, Cuenta Corriente N^o 0134-0332-59-3321059219.**

¡Todo aporte será profundamente agradecido!



VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Telefonnumero: 58 0212 6629224.
www.esperanto-venezuela.org
esperantove@gmail.com



Revista oficial de la Asociación Venezolana de Esperanto.